



Junio 1953. Nro 10.

LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Ĝiro Nro 537168

Jarabono 3 neĉ. guld. aŭ egalvaloro

KARAJ GEAMIKOJ!

Jam iom post iom proksimiĝas la dato, kiam denove nia kongreso estos malfermata, kiam denove dum plena semajno urbeto estos okupata de gejunuloj diversnaciaj.

Tiuj, kiuj jam antaŭe partoprenis en internacia kunveno scias, kia agrabla sfero regas dum tiu semajno. Ili scias, kiom da novaj amikoj ni trovas, ofte por la tuta vivo.

La organizado por nia 9-a kongreso bone progresas. La Loka Organiza Komitato faras ĉion eblan, ke la kongreso fariĝu por ni ĉiuj neforgesebla.

Vi certe demandas, kion ni faris ĝis nun por vi? Ni kun ĝojo sciigas vin, ke *por fari la restadkostojn grave pli malaltaj, ni kunportos kelkajn tendojn. Kondiĉe tamen, ke venos sufiĉe da interesigantoj. Vi do nepre anoncu sur la aliĝilo, ke vi volas uzi la tendon.*

Dum la kongreso Sro Dro A.

Halbedl, agento de Skolta Esp. Ligo en Aŭstrio, parolos pri skoltismo kaj ĝiaj rilatoj kun la tutmonda junularo, speciale per Esperanto.

Sro Williams, la gvidanto de angla aŭtobus-karavano, kiu intencas viziti ankaŭ nian IJK-n, montros filmojn pri niaj kongresoj en Haarlem kaj Ry.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis al nia certe unike bela kongreso, vi tuj faru tion, por ke ĉio laŭ via plaĉo ordiĝu. Sendu vian aliĝilon al la L.O.K. kaj samtempe pagu vian kotizon al via landa peranto. Se en via lando ne estas ankoraŭ peranto, bonvolu fari la pagon rekte al Sro Hans Steiner, poŝtĉekkonto 194.436, Wörgl.

La ceterajn informojn legu en ĉi revuo.

Ĉu ni renkontos en Wörgl ankaŭ vin?

Tammo Kanter.

Plifaciligu la laboron de la L.O.K. Aliĝu tuj!

PARENTEZE.

Saniga Regiono.

Estas somero. Mi vojaĝas en la eksterlando por viziti mian korespondantinon (ĉar mi estas virseksa).

Komforte mi sidas en la rapida vagonaro kaj admiras la belan panoramon de montoj kaj densaj arboj, tra kiuj kokete zigzagas rivereto.

Transe de mi sidas kamparano, kies vizaĝo havas ion abstraktan, ion, kio tute ne estas komforma al la bela pejzaĝo ekstera.

Ĉar fine la silento pikas mian babilemon, mi kolektas ĉiun kuraĝon por naskigi konversacion kun li. Propagandcele unue en Esperanto, sed la viro alrigardas min kvazaŭ mi estas la miraklo mem. Mi kolektas ankoraŭ pli da kuraĝo kaj provas mian malbonkvalitan lernejscion pri lia lingvo kaj — kun grandaj miri kaj kolero konstatas ke mia instruisto ĉiam malprave donis tre malbonan ciferon pri ĉi tiu fako — ĉar la stranga kunvojaĝanto eĉ komprenis min!

„Ĉu vi loĝas en ĉi tiu regiono?“ mi demandas.

„Jes“, estas lia plejeble mallonga respondo.

Tamen persiste mi daŭrigas:

„Ŝajnas al mi tre sanige ĉi tie“.

Kaj jen mia sukceso! Kiel februlo li nun parolas krie: „Ĉu sanige? Alrigardu min kiel ekzemplon. Kiam mi venis ĉi tien, mi estis tiel malforta, ke mi eĉ ne povis stari per miaj propraj kruroj! Harojn mi ne havis kaj oni devis min el — kaj enlitigi se bezonis mi la necesejon aŭ ion similan. Daŭris tre longe antaŭ ol mi kuraĝis transiri la straton, sed nun — bagatelo!“

Li ekstaras kaj mi respektplene alrigardas lin. Kian fortan korpon li havas!

„Sed tio estas fenomeno!“ mi ekstaze krias; „kaj ĉu vi jam longan tempon loĝas ĉi tie?“

Tutserioze li respondas „Mi naskiĝis ĉi tie“ — kaj stulte resilientadas

Tiam mi streĉas miajn krurojn por ekdormi kaj songas pri strangaj homoj.



ORGANIZAJ INFORMOJ:

Sekr.ejo Lombokstr. 2. LEEUWARDEN, Nederlando.

Nova Estraro: Pro la fakto, ke la estraro ĉijare preskaŭ entute eksigas, ni petas al la membroj jam nun pripensi la konsiston de la nova estraro. Ni volas substreki, ke por bona funkciado nepre estas necese, ke la taga estraro (do la prez., sekr., kaj la kasisto/administranto) loĝu en unu lando, prefere eĉ en la sama loko. La aliaj estraranoj (la asesoroj, resp. por Vojaĝ-Servo kaj Informa Fako) povas loĝi en diversaj landoj. Krome ni bezonas por 1953/1954 personon, kiu povas estri la Libro-Servon. Ĉi persono ne apartenas al la estraro.

Kolektiva aliĝo: Dum la jarkunveno de la Junulara Sekcio de Svisa Esperanto Societo oni unuanime akceptis la proponon de la prezidanto, Sro Bruno Graf, kolektive aliĝi al TEJO. Ni tutkore bonvenigas la Junular-Sekcion en nia organizo.

Gratuloj: Ni esprimas niajn plej bonajn dezirojn al nia peranto por la Pariza regiono, Sro Jacques Bertin pro lia edziĝo.

Bonvenon ni diras al nia plej juna ano Jaime, fileto de gesroj Ramon Molera Pedrala, en Moya, Hispanujo. Sincere ni gratulas la gepatrojn, fratineton Ana-Maria kaj la avinon. Li naskiĝis la 5an de aprilo.

En la mondon venis ankaŭ alia denaska Esperantisto, Bernard, filo de Daniel kaj Annick Luez, Laon, Francujo, la 22an de majo.

La perantoj bonvolu nepre tuj respondi je nia lasta demandaro.

LERNEJOJ KAJ LERNEJTEMOJ (2).

(Daŭrigo).

Esperanto celas instruiĝi al lernantoj, precipe en la gimnazioj kaj universitatoj. La fina celo efektive estas forigi instruadon pri fremdaj lingvoj en la lernejoj, esceptante al kelkaj tre lertaj studentoj. Eĉ pli fundamenta celo de Esperanto estas forigi la naciajn lingvojn, kaj radikigi kiel la sola lingvo de la mondo. La diversaj deklaroj de propagandemuloj ke tio ne estas vera, mem estas nur trompaĵo por gajni hezitantajn por nia movado.

Esperanto, do, devas instruiĝi kiel ĉefa fremdlingvo kaj ĉefa praktikata lingvo al la infanoj.

En la unua sistemo enigi Esperanton en la lernejojn estus tre facile, se la publiko volus tion. Malfacileco estas nur ke pro tio ke individuaj lernejoj devas por si mem decidi enkonduki Esperanton, la sola aŭtoritatulo por postuli tion estas la publiko mem, kaj la simpla fakto estas ke la publiko ne deziras instruadon je konstruita lingvo.

En la dua sistemo estas malfacile enirigi Esperanton, sed la konvinkenduloj estas malpli multaj. Deklaro de registara edukaŭtoritato, se ne deviga, estas almenaŭ tre influa.

Tial, por enigi Esperanton en la lernejojn, la dua sistemo estas multe pli bona. Alia avantaĝo estas, kompreneble, ke la edukaŭtoritatoj de diversaj nacioj povus akordi samtempe enkonduki Esperanton, tiel ke la lernantoj povus interkorespondi.

Kion oni devos fari por sukcesi rilate al la temo „Esperanto en la lernejoj”? Videble la farendaĵoj estas jenaj:

1. oni devos interesigi la instruistojn, kaj per ili la edukaŭtoritatojn. Por fari tion oni devos krei bonan faklaboradon. Precipe preparado de bonaj lernolibroj taŭgaj por lernejoj estas bezonata. Nur tre malmultaj tiaj nun ekzistas. Oni devas memori ke granda diferenco ekzistas

inter nedevisa klaseto eksterlerneja, kaj oficiala klaso deviga enlerneja, kiun devos ĉeesti lernantoj dum la tuta jaro, eĉ malgraŭ ilia volo.


2. Oni devos prepari kaj eldoni pliajn lingvistikajn verkojn. Instruistoj mem devas esti bone preparitaj por la instruado.

3. Bonaj legolibroj estas bezonataj. Mi konas nenium taŭgan legolibron nun akireblan. Legolibroj devas esti aranĝataj por sekvi la lecionojn en la lernolibroj.

4. Oni devos malfortigi iomete la propagandon inter „la subaj klasoj”, kaj koncentrigi siajn formojn por propagandi inter la „intelektularo”. Tio estas, forigi la emfazon nun tro ofte trovatan en diversaj landoj pri laboristoj, kaj emfazi science valoran instruadon kaj utilecon de la lingvo. Precipe la beletristikon oni devos pliemfazi.

5. Oni devos forgesi la malnovan ideon pri iu granda internacia kunveno kie registaroj akordos pri internacia lingvo, kaj memori la fakton ke registaroj ne estas kompetentaj prijuĝi lingvajn aferojn. Nur la lingvistoj, precipe la profesiaj edukistoj kaj filologoj, kompetentas. Kaj efektive, kiam la registaroj volas decidi pri fremdaj lingvoj, estas la lingvistoj kaj edukistoj kiuj decidas pri la detaloj. Do forta propagando inter la edukistoj kaj precipe la lingvistoj, plejparte farata de samfakuloj, estas plej bezonata. Oni precipe atentu ke la t.n. laborista, aŭ socialista teoriaro pri lingvo estas malakceptata de la plej multaj kompetentaj lingvistoj, do manko de emfazo pri „historia evoluo celanta unu komunan lingvon” estos nepre necesa. Se oni, precipe TEJO kaj ILEI, komencos subteni kaj plenumi la suprajn kvin punktojn, la progreso de Esperanto estos certigata.

Donald R. Broadribb.



9^a kongreso en Wörgl

Loka Organiza Komitato konsistas el la jenaj personoj:

Honora prezidanto: Kort. Kons. Sro Hugo Steiner, fondinto de la Int. Esp. Muzeo, Wien,

Prezidanto/sekretario: Sro Hans Steiner, iniciatinto de la Zamenhof-monumento en Wörgl,

Kasistino: F-ino Therese Kainer, urba oficistino,

Helpanto: Sro Josef Erlacher, instruisto.

EK AL TIROLO!

Ĉiu TEJO-ano scias, en kiu lando kaj loko okazos la nunjara TEJO-kongreso kaj legis en LJV kelkajn detalaĵojn pri la diversaj aranĝoj. Sed neniu ĝis nun eksciis ion specialan pri la unika ĉarmo, kiun prezentos al ĉiuj la zorgeme kunmetita programo. Per la sekvontaj linioj mi volas doni al vi la eblecon, spirite travojaĝi la „landon en la montaro“, konatiĝi kun la situo kaj ĉirkaŭaĵo de la kongresurbeto kaj iomete rigardi malantaŭ la kulisojn de niaj enprogramaj ekskursoj.

Kiu, venante el direkto Paris, Zürich aŭ Roma, jam trapasis la tirolan ĉefurbon, tiu rimarkos, ke la montgigantoj iom post iom iomete retirigas kaj per tio la valo de l'rivero Inn iom plilarĝigas. Sian plej grandan larĝecon la Inn-valo atingas tie, kie la rivereto Brixentaler Ache (venanta el flanka Briksenvalo) enfluas en la riveron Inn. Kaj ĉe la nomita kunfluejo situas la idilia urbeto Wörgl, nia nunjara TEJO-renkontejo.

Ĉiuflanke ĉirkaŭata de odorantaj

abiarbaroj kaj freŝverdaĵaj montetoj Wörgl similas al malgranda perlo enmeze de malmola ŝtono, ĉar tuj malantaŭ la montetoj levas gigantaj montaroj siajn krutajn rokopintojn, kvazaŭ ili volus diri: „Ni ŝirmas vin, juna, kuraĝa kaj progresema urbo, kiu per granita monumento por eternaj tempoj honoris la memoron pri D-ro ZAMENHOF. Ni ŝirmas vin, gastama urbo, kiu akceptos multajn gejunulojn el tuta mondo, gejunulojn, kiuj per Zamenhofs lingvo demonstracios por la paco kaj la amo inter la popoloj!“ — Kaj kvazaŭ eĉ je tiuj ĉi rokmontaraj ĵurpromesoj sonas ankoraŭ nun la belega poemo de la du gejunuloj, kiuj estas prezentataj al vi per la apuda fotobildo, kaj kun kiuj vi persone konatiĝos.

Danĝeraj povas esti la pli ol 2000 m altaj montgigantoj por tiuj, kiuj ne konas ilin aŭ intence preteraŭdas iliajn avertojn, sed bonaj, fidelaj amikoj ili estas al tiuj, kiuj ĉe ili serĉas verajn ripozon kaj refreŝigon por korpo kaj animo.

Ni, la tutmonda junularo, volas tre intime konatiĝi kun tiuj ŝirmantaj gigantoj, ni volas gajni ilian konfidon, por ke ili montru al ni la tutan belecon de la tirola montarmondo kaj malkaŝu al ni siajn sekretojn, kiujn ni konas ĝis nun nur laŭ rakontoj. Dum la kongreso ni havos sufiĉe da okazo por lifte aŭ piede supreniri, tien, kie oni sin sentas esti ekster la mondo; kaj tie ni plenkore ĝuos la belaĵojn de la montara regiono, enspiros la puregan montaraeron kaj sentos la spiron de la Kreinto kaj tie supre ni eĉ estos surprizataj per veraj tirolaj jodloj, ĉar junulara grupo de tirolaj kantistinoj, vestitaj per belegaj kostumoj tirolaj, nin akompanos. Kaj de la rokogigantoj, kiuj intertempe fariĝis niaj bonaj amikoj, la kantoj kaj jodloj resonos en belega eho — unika, neforgesebla kaj korgoĝiga travivaĵo por ni ĉiuj. — Kun ĝoĝŝvelita koro ĉiu partoprenanto post tia ekskurso revenos al Wörgl, al sia kongresurbeto, kie li ĝuos la plujajn tagojn en danko admiro pro la gigantaj impresoj surmontaj.

Alia neforgesebla fakto estos tiu, ke ni grupete remos en malgrandaj boatoj sur lago ĉe Kufstein fronte al la Kaiser-montaro, dum en apuda boato junulara kantistina horo en sia tirola kostumo kantas ĉarmajn tirolajn kantojn, kiuj per malforta venteto kune kun la nin ĉirkaŭantaj odoroj de la akvo kaj abiarbaro salute estos suprenportataj ĝis niaj

novaj amikoj — la pintoj de l'Kaiser-montaro, ĉe kies malsupro ripozas la trankvila malhelverda alplago.

Plua tre impresplena travivaĵo inter la multaj estos jena: Imagu! Plenaj de novaj ĝis nun nekonataj impresoj ni reveturas per Kaiserlifto aŭ reiras post banekskurso al la urbo Kufstein por atingi la trajnon al Wörgl. Jen — subite ni aŭdas konatajn muzikmelodiojn, kiujn dissendas giganta orgeno tra la tuta valo.

Kaj ĉu vi povas imagi la grandiozan rondrigardon de sur Hafelekar (montosupro) ĉe Innsbruck? la belegan perspektivon al la tirola ĉefurbo, al la Inn-valo kaj al la ĉirkaŭe situantaj montegoj kaj glaciejoj? Ĉu vi jam jam vidis ion similan el alteco de 2500 m?

Jes, karaj junaj geamikoj, tiuj ĉi kaj aliaj neforgeseblaj travivaĵoj atendos vin en Tirolo. Tial ne hezitu kaj ne plu prokrastu vian tujan anoncon kaj aliĝon al la kongreso.

Certe ĉiu lando, ĉiu ĝisnuna kongreso havas, resp. havis ion specialan, ion unikan, sed neniam ĝis nun kunvenigis vin TEJO en la plej multe prikantata montarlando. Do nepre venu al Tirolo, por ke en la perloĉeno de la TEJO-kongresoj ne manku al vi la plej bela, la pleje brilanta perlo, nome TIROLO!

Karaj junaj geamikoj, jen via devizo: Ek al Wörgl, ek al Tirolo!

Hans Steiner.

LISTO DE LA ĜIS NUN ALIĜINTOJ:

(Pro manko de spaco ni povas la nomojn nur en la sekva nro anonci.)
 Aŭstrujo 5 - Maroko 3 - Italujo 1 -
 Nederlando 1 - Danlando 1 - Anglujo 35 - Germanujo 17 - Entute 63 personoj el 7 landoj.

Speciala poŝtstampo: La Ĝeneral-

direktoro de Aŭstruja Poŝtadministracio, Dr. Karl Dworschak, senkoste disponigos specialan poŝtstampon por la TEJO-kongreso.

Kelkaj sciigoj por la gekongresanoj: La kongresanoj bonvolu kunporti fortajn ŝuojn (sed ne devas esti najlitaj) por la montekskursoj.

Tre malriĉaj partoprenontoj ha-

vas eblecon loĝi en granda barako ligna, en ĝi troviĝas nur elektra lumo kaj pajlo. La littuko(j)n, lankovrilo(j)n, kapkusenon, mantukon, sapon kaj la aliajn ilojn por ĉiutaga lavado kaj purigado ĉiu mem devas kunporti. La tranoktado en la barako estas senkosta, oni prenas nur unufojan sumeton de S 3.— por la nepre necesa pajlo.

Same estas sufiĉe da bona loko por la tendoj (ankaŭ tendi estas senkosta, sed ĉiu mem devas kunporti la tendon. Legu nepre *nian* ĉefartikolon!).

Karavanoj: Por angloj kaj belgoj verŝajne estos ebleco por kunvojaĝi kun la nederlanda aŭtobus-karavano. Kontakto kun la nederlanda pe-

ranto Koos Kranenburg, Steenshuur 10, Leiden, antaŭ la 25a de junio. Ankaŭ la nederlandaj partoprenantoj nepre anoncu sin antaŭ ĉi tiu dato.

Naciaj flagoj: La partoprenantoj de la kongreso nepre kunportu siajn naciajn flagojn (prefere 5—7 m longajn) por ornamo per ili la stacidoman placon kaj la kongresan salonegon. Por ĉi celo ni tre bone povos uzi ankaŭ malgrandajn, resp. diversgrandajn flagetojn. Ĉar la nombro de Esperantistoj en Wörgl ne estas granda, ni petas niajn geamikojn el la najbaraj landoj kunporti ankaŭ Esperantajn flagojn. Ju pli da flagoj, des pli festa la aspekto de nia salono.



Jen vi vidas la Zamenhofmonumenton en Wörgl en la tago de la inaŭguro. Antaŭ la monumento vi vidas la 11 jaran Hans Steiner (fileton de Sro H. Steiner) kaj la 13 jaran Elfi Messerer. Ili deklamis dum la inaŭgura ceremonio poemon en Esp. resp. en germana lingvoj.

LA INTERNACIA JUNULARKONGRESO EN WÖRGL.

Jarkunveno je merkredo, la 5an de aŭgusto 1953.

Fiksiĝis la jena tagordo:

1. Malfermo kaj superrigardo pri la nuntempa stato de TEJO.
2. Sekretaria jarraporto.
3. Kaskontrola raporto.
4. Financa jarraporto.
5. Buĝeto 1953—1954.
6. Raporto de Dokumentado kaj Gazetar-Servo.
7. Raporto de Informa Fako.
8. Raporto de Vojaĝ-Servo.
9. Raporto de la redakcio de LJV.
10. Elekto de la estraro; ĉiuj estraranoj laŭregulare eksiĝas: reelektebla estas Michel Duc Goninaz.
11. Elekto de kaskontrola komisiono.
12. I.J.K. 1954. Eblecoj... en Belgujo, en Sudgermanujo.
13. La Juna Vivo kaj La Burĝono; aspekto kaj enhavo.
14. Propagando.
15. Kunlaboro kun aliaj junulargrupiĝoj; stato en diversaj landoj kaj eblecoj.
16. Helpe al nepagipovaj landoj; kion ni faris kaj kion ni faros.
17. Proponoj (vidu aliloke).
18. Diskutoj.
19. Fermo.

Kvankam de la membroj ne envenis multaj proponoj (nur unu), ni en ĉi tiu numero tamen jam publikigas ilin, pro tio ke la loko en la venonta numero verŝajne ne permesas ilian enpresigon kaj por ke la leganto jam nun havu la okazon pristudi la diversajn aferojn.

PROPONOJ POR LA JARKUNVENO.

- a. Fiksi la kotizon por 1953/1954 por aktivaj membroj kaj subtenantoj je g. 4,— kaj tiun de la aspirantaj membroj denove je g. 2,—.

Klarigo:

Pro la pli bona aspekto kaj pliampleksiĝo de LJV, ĝiaj kostoj plialtiĝis. Ĉar estas nepre necese, ke nia organo restu en ĉi tiu stato por pligrandigi la membro-

nombron, ni estas devigataj plialtigi la kotizojn de la 2 unue nomitaj kategorioj.

- b. Fiksi la kotizon de kolektive aliĝintaj grupiĝoj po g. 0,30 aŭ unu ĝustestampita internacia respondokupono por ĉiu membro.

La kol. aliĝ. grupiĝoj ricevu po 20 membroj unu ekz. de LJV, havu la rajton uzi la diversajn servojn, kiujn TEJO prezentas, dum ke ĝiaj membroj ĝuu iom da rabato rilate al la kongreskotizo por ne-TEJO-membroj.

- c. Perantoj havu la rajton, en konsento kun la estraro kaj la membroj en la koncerna lando, plialtigi la kotizon, favore al landa kaso.

Klarigo:

De tempo al tempo montriĝas, ke la landaj perantoj disponas pri

tro malmultaj financaj rimedoj por povi bone prilabori la diversajn terenojn al ili konfiditajn. Nur tiamaniere la estraro vidas solvon, kiu do dependas de la kunlaboremo de la membroj mem.

ĉ. Ŝanĝi paragrafon 2b, punkto f) en:

... kontakto kaj kunlaboro kun aliaj esperantistaj organizoj, *precipe junularaj, senkonsidere ilian tendencon.*

Klarigo:

Por pli bone atingi la celojn nomitaj sub par. 2a de la regularo estas necese, ke TEJO povu penetri ankaŭ en tendencaj rondoj esperantistaj. TEJO ja estas suptendenca kaj precipe pro tio ne devas ekskluzivi certan kategorion for el sia labortereno.

d. Aldoni en la regularo al paragrafo 8ĉ:

La prezidanto direktas la laboron de la estraro *kaj krome okupas sin pri la organizado de la kongreso en kunlaboro kun L.O.K.*

Klarigo:

La sekretario ĝenerale estas tro okupita por povi sin plene dediĉi al ĉi tiu tasko. Krome la prezidanteco ne estas tiom temporaba dum la jaro.

e. Aldoni kaj ŝanĝi en la regularo al paragrafo 8 ĉ:

La asesoroj dividas inter si la fakojn kaj servojn, kiujn komisiis al ili la Ĝenerala Membro-Kunveno aŭ la Prezidanto kun aprobo de la Ĝenerala Membro-kunveno, krom tio, ktp.

f. Plivastigi la laborkampojn de Vojaĝ-Servo, tiusence ke ankaŭ *ne-TEJO*-membroj povas partopreni.

Klarigo:

Jam dum la Int. Junularkunveno en Basel (3-4 marto 1952), en kiu ĉeestis gejunuloj el Francujo, Svislando kaj Germanujo oni esprimis sin per rezolucio al la fondo de Internacia Centro Esperantista por Personaj Interŝanĝo. Provizore la sidejo de ICEPI estus tiu de GEJ (Germana Esperanto-Junularo), ĝis kiam „organizo, kapabla ĝin administri” povas transpreni ĝin. Ankaŭ dum esperantista renkontiĝo en Orterberg, Sudgermanujo, oni faris la proponon organizi la interŝanĝon de esperantistaj gejunuloj. Nome de la Junulara Sekcio de Svisa Esperanto Societo ĝia prezidanto B. Graf sekve de tio proponas al TEJO akcepti tiun taskon. La estraro de TEJO tre favoras ĉi tiun proponon kaj samopinias ke tia laboro devas esti en la manoj de int. organizo.

„Propono pri interŝanĝo de esperantistaj gejunuloj.

TEJO starigu agentejon, ĉe kiu estas haveblaj adresoj de gejunuloj kiuj deziras pasigi restadon en certa lando. Minimuma daŭro: unu semajno. Aĝlimo: 30. Kondiĉoj: interesuloj devas deklari sin pretaj akcepti por la sama daŭro la gastigonton.”

Daŭrigo de Esp.radias

al Radio Zagreb. La elsendoj okazas en la ekstrema komenco de ĵaŭdo (vidu supre!). Nepre skribu al Radio Zagreb, Esperanto-fako, por danki kaj esprimi viajn dezirojn. Espereble la dissendoj daŭros ankaŭ post la kongreso! Tio ĉefe dependos de la skribaj aplaŭdoj de la geaŭskultantoj.

Informojn pri Esperanto-radio-disendo sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TIERKWERD (Frislando), Nederlando.



esperanton radías..

Listo de radiodissendoj en aŭ pri
Esperanto kaj informoj.

Tempindiko laŭ mezeŭropa horsiste-
mo.

Mallongigoj: I = informoj. P = pa-
rolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

DIMANĈE:

09.24—09.30 Osijek (Jugoslavujo), 202,2 m.: I pri la Universala Esperanto-
Kongreso en Zagreb (25/VII—1/VIII/1953), pri Esp. ĝenerale
kaj pri Jugoslavaj arto, literaturo, muziko.

LUNDE:

22.35—22.40 Vieno I, 25,46 m., 48,74 m., 513 m.:P.

MARDE:

12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: P de d-ro Arthur Baur.

16.00—16.20 Vieno II, 25 m., 30 m., 41 m., 48 m., 203 m.; P (nur ĉiudua-
marde).

18.35—18.40 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: Ripeto de posttagmeza dissendo.

MERKREDE:

16.45—17.00 Graz (Aŭstrujo), 417,2 m.: K. (Nur ĉiuduamerkrede: 17/VI/
1953 k.t.p.).

19.00—19.20 Romo, 25,21 m., 31,35 m., 49,92 m.: P.

20.30—21.00 Madrido (Radio S.E.U.), 42,33 m., 225 m.: P.

22.45—23.15 Valencio, 43 m.: P kaj I.

23.15—23.20 Hilversumo II, 298 m., 188 m., sed post 1/VII: Hilversumo I,
402 m., V.A.R.A.: I.

JAŬDE:

00.05—00.20 Zagreb (Jugoslavujo), 264, 7 m.: I. pri la Universala Esperanto-
kongreso en Zagreb (25/VII—1/VIII/1953), pri Esp. ĝenerale
kaj pri jugoslavaj arto, literaturo, muziko k.t.p.

08.35—08.40 Rijssel (Lille) (Francujo), 218 m.: I.

09.30—09.45 Parizo, 348 m.: K de Pierre Delaire.

12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: P. de prof. d-ro E. Privat.

18.35—18.40 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: Ripeto de la posttagmeza dissendo.

VENDREDE:

19.00—19.20 Romo, 25,21 m., 31,35 m., 49,92 m.: P kaj M.

23.15—23.10 Hilversumo II, 298 m., 188 m., N.C.R.V.: P kaj M. (Nur la
unuan aŭ duan vendredon de ĉiu monato).

SABATE:

09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m.: K kaj I.

23.15—23.20 Hilversumo I, 402 m., sed post 1/VII/1953: Hilversumo II,
298 m., 188 m., K.R.O.: I.

Informoj kaj petoj:

Denove ĉiutage Esperanto en la etero. — Ni speciale atentigas la radio-
aŭskultantojn pri du novaj stacioj en la supra listo: Osijek (dimanĉe) kaj
Zagreb (en la nokto de merkredo al ĵaŭdo). Vieno I saltis al lundo.

Radio Zagreb. — La inaŭguro de la Esperantaj elsendoj de Radio Zagreb
okazis laŭ aranĝo la 16-an de aprilo 1953. Per sonela parolado d-ro Ivo Boro-
veĉki, prezidanto de la L.K.K., salutis la geaŭskultantojn kaj esprimis dankon
daŭrigo sur la antaŭa paĝo.



NE RESPONDECAS
T.E.J.O.

Mi trovis la stilon de la „Bremenaj Stratmuzikantoj” pli simpla kaj taŭga por la pli progresintoj inter la lernejoj, post eble tri jaroj da lernado, do je la aĝo kutime de 14 jaroj. Tamen eĉ nun mi mem evitus sur p. 67. diri „fariĝi” kaj anstataŭus „esti” kaj sur p. 79. mi dirus simple eĉ se ne tiel precize, „kuŝis”, kaj mi ellasus „daŭre”. Ĉiam mi serĉus, kiel simpligi. La fakto restas, ke oni ne povas supozi, ke iu lernejo volas pagi du guldenojn por du paĝoj en gazeto. Se vi mem estus denove tia persono, ĉu vi? Mi parolis pri la afero kun F-ino Chesterton, kiu estas unu el la instruistinoj ĉe Tinkers Farm-Lernejo en Birmingham. Tie oni lernas kaj dum longa tempo subtenas TEJO-n. Ŝi diris, ke post la tempo de la porlerneja aparta gazeto, kun konkursoj, kiujn la knabinoj amis, oni tute ne povas aboni la gazeton. La junaj lernantinoj ne estas idealistoj, kiuj

abonas nur pro la bona afero! Eĉ kiam la gazeto kostis po 2, 3 pencoj, ŝi havis malfacilaĵon tiri la monon el la poŝoj. Efektive ili aliĝas TEJO-n nur kiam ili preparas partopreni TEJO-an kongreson. Tion ili ne sukcesis aranĝi por fari grupon dum la lastaj du jaroj pro la kosto de la vojaĝo. Tio estas neebla por sufiĉe multaj knabinoj.

Tamen la grava laboro de TEJO trovas sian kulminon en la Kongresoj. Sen ili ne estus loko por la gviditaj grupoj el lernejoj, kiuj ebligas la kunvojaĝadon de junaj personoj, kies gepatroj ne permesus ilin vojaĝi aparte.

Ŝajnas al mi, ke se vi ne havas multajn abonantojn, kiuj aprobas la paĝojn de „La Burgono”, estus pli bone forlasi tiun parton, kaj anstataŭe enmeti konkursojn, enigmojn k.t.p. kiuj interesus pli multe la junajn gelernantojn, kaj samtempe forte agi por simpligi la lingvon de preskaŭ ĉiu artikolo, eĉ por la plej progresintoj, ĉar tiuj povus legi la aliajn gazetojn de la plenaĝuloj. Oni forte sentas la mankon de simpla, populara gazeto, ne nur por la junuloj, kaj povas esti, ke „La Juna Vivo” povus esti tia, kun oftaj artikoloj pri landaj kutimoj, vojaĝado, k.t.p.”

Violet C. Nixon.

Nia Redakcio ricevis el Ĉeĥoslovakujo la jenan multobligitan leteron:

ESPERANTO-ASOCIO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO
Malá Stepánská 7
PRAHA II

Al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, Estogazetoj kaj Esperanto-eldonejoj. Karaj samideanoj,

Ni informas vin kun sincera bedaŭro, ke la ESPERANTO-ASOCIO en ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO likvidiĝis. Ĝia organo „Esperantista” ne plu aperas jam de post komenco de la jaro 1952.

Ni petas vin ne plu adresi iajn sendaĵojn al nia adreso, ĉar nia oficejo dum plej proksimaj tagoj ne plu ekzistas.

Se laŭ via opinio estas konvene, ke la ĉeĥoslovakaj esperantistoj restu informitaj pri la Esperanto-movado, tiam bonvolu sendadi vian organon kaj viajn eldonaĵojn al la prezidanto de la Esperantista klubo en Praha laŭ adreso:

Praha, la 28-an de novembro 1952.

s-o Jaroslav Šustr., Dlouhá 10,
Praha I.

Por tiu subteno akceptu nian antaŭan dankon.

Ni premas sincere manon al niaj multaj amikoj tra la tuta mondo kaj ni restas

kun samideana saluto

Esperanto-Asocio en
Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Noto de la Redakcio.

Ni sincere esperas, ke la supran „adiaŭ”-on baldaŭ sekvos la renaskiĝo kaj ke niaj ĉeĥoslovakaj geamikoj tiam eklaboros kun pli freŝa energio kaj pli nova forto.

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



RUZA PETRO KAJ LA FIERA VIRO.

(Bulgara popola fabelo.)

Ruza Petro estis tre malriĉa viro. Sed li estis saĝa. Li multe laboris por malmulta mono. Dum la printempo, dum la somero kaj dum la aŭtuno li laboris sur la kampoj. Dum la vintro neĝo kovris la kampojn. Tiam li devis serĉi alian laboron. Sed kian? Li kolektis ligno-pecojn en ia arbaro. Ruza Petro ligis ilin en faskon. Poste li vendis la lignon en la urbo. Tiel li povis ankaŭ dum la vintro gajni monon.

Iun tagon li trovis en la arbaro belajn, longajn branĉojn. Ili estis sufiĉe dikaj. Ruza Petro ĝojis, ĉar per dikaj ligno-pecoj oni pli bone povas hejti ol per maldikaj. La urbo estis proksime. Ruza Petro portis la lignon sur-dorse. Lia dorso estis kurba pro la ŝarĝo. Li ne povis rigardi supren. Tial li kriis tre laŭte: „Gardu vin! Gardu vin!” Li volis, ke la homoj iru flanken.

La vintro estis malvarma kaj la vento akre blovis. Ruza Petro malrapide iris kaj kriis: „Lignon aĉetu!” Kaj poste li denove kriis: „Gardu vin! Gardu vin!”

Sur la strato iris riĉa homo. Li ne deziris aĉeti lignon. En lia domo estis agrable varme. Kvankam li aŭdis la admonon de Ruza Petro, li ne volis iri flanken. Li pensis: „Mi estas riĉa homo. Ruza Petro estas tre malriĉa. Li devas iri flanken, kiam mi volas promeni.”

Sed Ruza Petro ne vidis lin, ĉar la ligno estis peza sur lia dorso. Li povis nur admoni: „Gardu vin! Gardu vin!”

La riĉa homo estis tre fiera. Li iris preter Ruza Petro. Sed, ho ve! La ligno-pecoj estis longaj. Unu peco da ligno difektis la veston de la fiera sinjoro. Li koleris multe. Li atakis Ruzan Petron kaj kriis al li:

„Ĉu vi ne povas iri flanken, kiam sinjoroj promenas sur la strato? Mi iros al la juĝisto. Li devos puni vin. Vi meritas tion.”

Ruza Petro tre bedaŭris, kio okazis. Li diris: „Pardonu sinjoro, mi ne

vidis vin. La vento blovis la neĝon en mian vizaĝon. Mi ne povis rigardi."

La riĉa viro ne volis aŭskulti al la pardonpeto de Ruza Petro. Li iris al la juĝisto. Kaj Ruza Petro devis iri kun li.

Ĉe la juĝisto rakontis la riĉa viro, kio okazis. Li diris:

„Sinjoro juĝisto, mi promenis sur la strato. Tiu ĉi viro portis lignon sur la dorso. Li ne volis iri flanken. Per la longaj ligno-pecoj li difektis miajn vestojn. Mi deziras, ke vi punu lin. Li devu pagi miajn vestojn."

La juĝisto longe rigardis al la riĉa viro kaj poste al la malriĉa viro. Li demandis: „Ĉu vi aŭdis, kion ĉi tiu sinjoro diris? Kio estas via nomo? Mi deziras, ke ankaŭ vi rakontu al mi, kio okazis."

La malriĉa viro silentis. La juĝisto ripetis sian demandon. Sed la malriĉa viro silentis. Por la tria fojo diris la juĝisto:

„Kial vi ne parolas? Ĉu vi estas muta? Aŭ ĉu vi estas surda? Ĉu vi ne aŭdas, kion mi demandas?"

La malriĉa viro nenion respondis. La juĝisto turnis sin al la riĉa viro: „Kial vi kondukas al mi mutan viron? Kiel mi juĝu pri lia ago, kiam li ne povas sin defendi?"

La riĉa viro estis tre-tre kolera. Li kriis al Ruza Petro: „Kial vi faras, kvazaŭ vi estas muta? Kial vi ne krias ankaŭ ĉi tie tiel laŭte, kiel vi tion faris sur la strato?"

Sed Ruza Petro nenion diris. La juĝisto demandis nun la malriĉan viron: „Kial vi ne parolas?" Sed Ruza Petro silentis.

Tiam demandis la juĝisto la riĉan viron: „Kion li do kriis?"

Kaj la riĉa viro respondis:

„Li kriis sur la strato tre laŭte: „Aĉetu lignon!" Kaj poste li kriis: „Gardu vin!" Mi diras al vi, sinjoro juĝisto, ke li ne estas muta, li tre bone povas paroli."

La juĝisto rigardis al la riĉa viro.

„Kaj kial vi ne gardis vin?"

La riĉa viro respondis fiere:

„Ĉu mi devas flanken iri pro malriĉulo? Neniam!"

Kaj la juĝisto diris al li:

„Foriru kaj estu kontenta, ĉar mi ne punas vin. Justeco devas regi."

Kun kolera vizaĝo foriris la riĉa viro.

Poste diris la juĝisto al Ruza Petro:

„Iru ankaŭ vi kaj vendu vian lignon."

Ruza Petro dankis la juĝiston kaj baldaŭ oni povis aŭdi lian laŭtan kriadon:

„Lignon aĉetu lignon aĉetu! Gardu vin gardu vin!"

Kompilita laŭ du diversaj tradukoj, ensenditaj de sroj Asparuk Ivanov, Kazanlik kaj

Marin W. Koev, str. Ĉumerna 6. Kazanlik,

Bulgarujo.